

Saluton !

He aquí un nuevo número del Boletín Electrónico de la [Federación Española de Esperanto](#).



Jen nova numero de la Bitbulteno de [Hispana Esperanto-Federacio](#).

EL 73 CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO ENFATIZA LA IMPORTANCIA DE LA LENGUA INTERNACIONAL COMO PUENTE ENTRE LAS PERSONAS

El domingo 4 de mayo se clausuró el 73 Congreso Español y 18 Andaluz de Esperanto, que durante cuatro días se ha celebrado en la ciudad de Ronda, Málaga. Participaron algo más de 150 personas, procedentes no sólo de la mayoría de regiones españolas, sino también de otros países de Europa, América y el norte de África. La [resolución aprobada](#), apoyándose en uno de los rasgos más reconocibles de la ciudad, enfatiza la idea del esperanto como puente entre los seres humanos, por encima de barreras y fronteras. Precisamente la situación en el Norte de África, algunos de cuyos invitados no pudieron llegar por problemas de permisos y cuyo movimiento esperantista comienza a renacer en estos últimos años, fue uno de los ejes del Congreso.

El congreso fue [inaugurado](#) por la primera teniente de alcalde, Isabel Barriga, junto con los presidentes de la Federación Española de Esperanto, José Antonio del Barrio, de la Asociación Andaluza, Ángel Arquillos, y del Comité Organizador, Juan Diego Díaz. La ciudad de Ronda acogió calurosamente el Congreso y los participantes pudieron disfrutar de la cultura local en diversos espectáculos en el Palacio de Congresos y en la Peña Flamenca.

Por su parte, los esperantistas mostraron su voluntad de apoyar el anhelo de la ciudad por convertirse en Patrimonio de la Humanidad, llevando el nombre de Ronda a todos lugares donde está presente la dispersa comunidad de hablantes del idioma internacional. A título de ejemplo, durante toda la semana Ronda ha ocupado la portada como [artículo destacado](#) de la Wikipedia en esperanto.

Además de diversos eventos culturales, durante el Encuentro tuvieron lugar sesiones de trabajo

LA 73-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EMFAZAS LA GRAVECON DE LA INTERNACIA LINGVO KIEL PONTO INTER LA HOMOJ

Dimanĉe la 4-an de majo estis fermita la 73-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu kune kun la 18-a Andaluza Kongreso disvolviĝis en la urbo Arundo (Ronda) dum kvar tagoj. Partoprenis pli ol 150 homoj, venantaj ne nur el plejmulto de hispaniaj regionoj, sed ankaŭ el aliaj landoj de Eŭropo, Ameriko kaj Norda Afriko. La aprobita rezolucio, [legebla komplete en tiu ĉi ligilo](#), sin apogante en unu el la plej rekoneblaj trajtoj de la urbo, emfazas la ideon de Esperanto kiel ponto inter la homoj, preter limoj kaj barieroj. Ĝuste la situacio en Norda Afriko, kelkaj el kies invititaj esperantistoj ne povis veni pro problemoj de permesoj, kaj kies esperantista movado iom post iom renaskiĝas dum la lastaj jaroj, fariĝis unu el la aksoj de la Kongreso.

La Kongreso [estis inaŭgurita](#) de la unua vicurbestro de Arundo, Isabel Barriga, kune kun la prezidantoj de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, de la Andaluza Esperanto-Unio, Ángel Arquillos, kaj de la Loka Kongresa Komitato, Juan Diego Díaz. La urbo Ronda varme akceptis la Kongreson, kaj la partoprenantoj povis ĝui la lokan kulturon per diversaj spektakloj disvolviĝintaj en la Kongresa Palaco kaj la Flamenka Rondo.

Siavice, la esperantistoj montris sian volon apogi la sopiron de la urbo fariĝi Monda Heredaĵo, portante la nomon de Arundo (Ronda) al ĉiuj lokoj kie troviĝas la dissemiita komunumo de parolantoj de la internacia lingvo. Nur kiel ekzemplo, dum la tuta semajno Arundo okupis la ĉefpaĝon de la Vikipedio en Esperanto, kiel [elstara artikolo](#).

Krom la diversaj kulturaj eventoj, dum la Renkonto okazis laborkunsidoj kaj debatoj pri la situacio de la internacia lingvo, same kiel diversaj organizaj aktivaĵoj. Oni krome celebris

o debates sobre la situación del idioma internacional, así como diferentes actividades organizativas. Además, se celebraron homenajes, entre otros, al recientemente fallecido Gabriel García Márquez, cuyo libro "Cien años de soledad" está [traducido al esperanto](#), al profesor Juan Régulo Pérez, uno de los principales editores en esperanto y de cuyo nacimiento se cumple este año el centenario, y a Blas Infante, que además de padre del nacionalismo andaluz fue un destacado hablante y defensor del esperanto.


Durante estos días estamos publicando en [el canal de Youtube](#) diversos vídeos sobre el encuentro. Se puede comenzar por degustar un pequeño aroma del congreso en el siguiente [breve vídeo resumen](#).

[SEGUIR LEYENDO...](#)

diversajn omaĝojn, inter alie al la ĵus forpasinta kolombia verkisto Gabriel García Márquez, kies libro "Cent jaroj da soleco" estas [tradukita al Esperanto](#), al profesoro Juan Régulo Pérez, unu el la ĉefaj eldonistoj en nia lingvo kaj la centan datrevenon de kies naskiĝo ni ĉijare kunmemoras, kaj al Blas Infante, konsiderata patro de la nuna andaluzismo, tre ligita al Arundo, kaj kiu estis konata parolanto kaj defendanto de Esperanto.

La kongreso estas nun grandparte ĝuebla en la reto por tiuj kiuj ne povis ĝin partopreni. Dum tiuj ĉi tagoj ni iom post iom montras filmetojn tie registritajn, en la [jutuba kanalo de Hispana Esperanto-Federacio](#). Oni povas komenci per [tiu ĉi mallonga resumo](#).

[LEGU PLU...](#)



LA ENSEÑANZA DEL ESPERANTO, UNO DE LOS EJES DEL CONGRESO

Uno de los ejes del pasado Congreso de Esperanto fue la enseñanza del esperanto, en España y el resto del mundo. Como anunciamos en nuestro anterior *Bitbulteno*, durante estos días se celebró un Simposio específico sobre la materia, con conferencias y debates, y también con la impartición de cursos a diversos niveles. También tuvieron lugar exámenes oficiales de esperanto, de acuerdo con el Marco Común Europeo de Referencia para las Lenguas, con notable éxito, al que no fue ajeno la presencia de Katalin Kováts, responsable de la organización [edukado.net](#), que dio [una conferencia](#) sobre la situación actual de la enseñanza oficial del esperanto.

Entre las conclusiones más concretas de la Conferencia se puede citar la refundación oficial de la sección de enseñanza de la Federación Española de Esperanto. Otro resultado ha sido la creación de un grupo de trabajo sobre reconocimiento oficial de los diplomas de esperanto en las universidades españolas. Si deseas colaborar con cualquiera de esas iniciativas o cualquier otra relacionada con la enseñanza del esperanto, escríbenos a kurso@esperanto.es.

INSTRUADO DE ESPERANTO FARIĜIS UNU EL LA AKSOJ DE LA KONGRESO

Unu el la ĉefaj aksoj de la pasinta Hispana Kongreso de Esperanto estis la instruado de la internacia lingvo, en Hispanio kaj la cetera mondo. Kiel ni anoncis en antaŭa *Bitbulteno*, dum tiuj ĉi tagoj oni organizis specifan Simpozion pri tiu fako, kun prelegoj kaj debatoj, kaj ankaŭ kun instruado de kursoj diversnivelaj. Disvolviĝis ankaŭ oficialaj ekzamenoj de Esperanto, akorde kun la Komuna Eŭropa Referenckadro, kun notinda sukceso, al kiu kontribuis la ĉeesto de Katalin Kováts, respondeculo de la organizaĵo [edukado.net](#), kiu ankaŭ [prelegis pri la nuna stato de la oficiala instruado](#) de Esperanto.

Inter la ĉefaj konkludoj de la Konferenco oni povas mencii la refundadon de la instruista fako de Hispana Esperanto-Federacio. Alia rezulto estas la kreado de laborgrupo pri la oficiala agnosko de la diplomoj pri Esperanto en la universitatoj de Hispanio. Se vi deziras kunlabori en iu ajn el tiuj iniciatoj, aŭ aliaj rilataj al instruado de Esperanto, bv. skribi al kurso@esperanto.es.

RICO PROGRAMA CULTURAL

El Encuentro de Esperanto de Ronda se

RIĈA KULTURPROGRAMO

La Esperanto-Renkontiĝo de Arundo sin

caracterizó también por un rico programa cultural, muy variado, que combinó diversas manifestaciones de la cultura esperantista con el disfrute de la local.

El flamenco, y en general la música andaluza, tuvo un protagonismo especial, con actuaciones en la Peña Flamenca, que se convirtió en una subsección del Congreso. En ella se celebró además un concierto especial, que se convirtió en uno de los principales eventos del encuentro, con la intervención de JoMo, uno de los más conocidos cantantes en esperanto, y de María Villalón, que interpretó piezas de su repertorio, incluyendo dos en [una versión en esperanto](#). Otros conciertos de diferentes estilos incluyeron una muestra de música andalusí, así como la participación del cuarteto [Kvaropo Sinkopo](#) durante la inauguración oficial.

Una nueva edición del espectáculo "*Vivu la teatro!*", celebrado en el Teatro Municipal de Ronda, incluyó una mezcla de piezas poéticas, teatrales y musicales interpretadas por los propios participantes en el Congreso, bajo la dirección del poeta Miguel Fernández.

Se produjeron también presentaciones de libros, conferencias, muestras de bailes, etc., en una buena representación de la cultura esperantista e internacional.

karakterizis ankaŭ per riĉa kultura programo, tre varia, kiu kombinis diversajn manifestaciojn de la esperantista kulturo kun la ĝuado de tiu loka.

Flamenko, kaj ĝenerale la andaluza muziko, speciale ĉefrolis, per diversaj spektakloj en la Flamenka Rondo, kiu fariĝis kvazaŭ dua subsidejo de la Kongreso. En ĝi disvolviĝis speciala koncerto, kiu iĝis unu el la ĉefpintoj de la Renkontiĝo, per la partopreno de la fama tuluza kantisto JoMo, kaj de la en Hispanio sufiĉe fama arunda popkantistino María Villalón, kiu interpretis pecojn de sia repertuaro, inklude de du en [versio en Esperanto](#). Aliaj muzikaj stiloj inkludis koncerton de alandalusa muziko kaj la partopreno de [Kvaropo Sinkopo](#) dum la oficiala inaŭguro.

Nova eldono de la spektaklo "*Vivu la teatro!*", celebrita en la Municipa Teatro de Arundo, enhavis miksaĵon de pecoj poeziaj, teatraj kaj muzikaj, interpretitaj de kongresaj partoprenantoj mem, sub la reĝisorado de la poeto Miguel Fernández.

Ankaŭ estis organizitaj prezentadoj de libroj, prelegoj, dancoj, ktp, en bona reprezentado de la vasta esperantista kaj internacia kulturo.

Flamenko en Arundo



BUEN ECO EN LOS MEDIOS DE COMUNICACIÓN

El Congreso Español y Andaluz de Esperanto fue recogido de manera amplia en diversos medios de comunicación.

Por su amplitud puede citarse en primer lugar la entrevista realizada al presidente de la Federación Española de Esperanto la víspera del comienzo del Congreso, en el programa "Esto me suena - Las tardes del Ciudadano García", en Radio 1, y que puede escucharse [en este enlace](#).

Durante los días del encuentro y los cercanos aparecieron amplios reportajes sobre el mismo, principalmente en medios locales y regionales. Algunos de ellos pueden examinarse en la [colección de recortes de prensa](#) archivados en la *Bitoteko* de HEF.

BONA EĤO EN AMASKOMUNIKILOJ

La Hispana kaj Andaluza Kongreso de Esperanto estis amplekse montrita en diversaj amaskomunikiloj.

Pro sia amplekso indas citi unualoke la intervjuon al la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio en ĉefa vespera programo de la ŝtata radio Radio 1 "La vesperoj de Civitano García", la antaŭtago de la komenco de la Kongreso, kiun oni povas aŭskulti [en jena ligilo](#).

Dum la tagoj de la Renkonto kaj ĉirkaŭaj aperis pluraj raportoj pri ĝi, ĉefe en lokaj kaj regionaj komunikiloj. Plurajn oni povas ekzameni en la [kolekto de gazeteltondaĵoj](#) arĥivataj en la *Bitoteko* de HEF.



ESPERANTO EN LA FERIA DE LA ECONOMÍA SOCIAL DE MADRID

La Federación Española de Esperanto, junto con el Liceo Madrileño de Esperanto, participará en la II Feria de la Economía Social de Madrid, que tendrá lugar los días 31 de mayo y 1 de junio en el [Centro Cultural Matadero](#). Puede leerse más información sobre el carácter y objetivo del evento en [este enlace](#).

Invitamos a nuestros amigos y simpatizantes a visitarnos durante la misma. También invitamos a los esperantistas madrileños y de los alrededores a colaborar en la organización de nuestra participación. Poneros en contacto con este boletín para conocer más detalles.

HEF EN LA FOIRO DE SOCIA EKONOMIO DE MADRIDO

Hispana Esperanto-Federacio, kune kun Madrida Esperanto-Liceo, partoprenos la 2-an Foiron de la Socia Ekonomio de Madrido, kiu disvolviĝos inter la 31-a de majo kaj la 1-a de junio en la Kultura Centro [Matadero](#). Oni povas legi plu pri la karaktero kaj la celo de la evento, hispanlingve, en [tiu ĉi ligilo](#).

Ni invitas niajn amikojn kaj simpatiantojn viziti nin dum la Foiro. Ni ankaŭ alvokas la madridajn kaj najbarajn esperantistojn kunlabori en la organizado de nia partopreno. Kontaktu la redaktantaron de tiu ĉi Bitbulteno por koni pliajn detalojn.

JÓVENES ESPERANTISTAS EN EL PARLAMENTO EUROPEO

Entre el 9 y el 11 de mayo ha tenido lugar en la sede del Parlamento Europeo en Estrasburgo un encuentro de representantes de asociaciones internacionales de la Unión Europea, en el que participaron unos 5.000 jóvenes. Asistió una amplia representación de la Asociación Mundial de Jóvenes Esperantistas (TEJO), entre los cuales Enric Baltasar, de la [Asociación Valenciana de Esperanto](#).

El encuentro, llamado [EYE2014](#), consistió en gran número de charlas, debates, conciertos, actividades lúdicas y de otro tipo, sobre todo en el Parlamento pero también en la ciudad de Estrasburgo, bajo el lema "Ideas para una Europa mejor".

Los participantes esperantistas tuvieron ocasión de mostrar al resto de asistentes y al personal del Parlamento Europeo, que el esperanto es una lengua que funciona y permite la comunicación entre los jóvenes de todo el continente. Más información sobre la organización y las conclusiones puede leerse en valenciano en la [web de la Asociación Valenciana de Esperanto](#).

ESPERANTISTAJ JUNULOJ EN LA EŬROPA PARLAMENTO

Inter la 9-a kaj la 11-a de majo estis organizita en la sidejo de la Eŭropa Parlamento en Strasburgo renkontiĝo de reprezentantoj de internaciaj asocioj de la Eŭropa Unio, en kiu partoprenis ĉirkaŭ 5.000 junuloj. Ĉeestis ampleksa grupo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), inter kiuj Enric Baltasar, de la [Valencia Esperanto-Asocio](#).

La renkonto, nomita [EYE2014](#), konsistis el granda kvanto da prelegoj, debatoj, koncertoj, distraĵoj kaj alitipaj aktivaĵoj, ĉefe en la sidejo de la Parlamento sed ankaŭ en la urbo Strasburgo, sub la devizo "Ideoj por pli bona Eŭropo".

La esperantistaj partoprenantoj ĝuis la okazon montri al la ceteraj partoprenantoj kaj al la laborantoj en la Eŭropa Parlamento, ke Esperanto estas lingvo funkcia kaj ebliganta komunikadon inter junuloj el la tuta kontinento. Pliajn informojn eblas legi en la [retejo de la Valencia Esperanto-Asocio](#).



PRESENTACIÓN DEL ESPERANTO EN SORIA

Con ocasión del Día de Europa, la sección de la Escuela Oficial de Idiomas en El Burgo de Osma (Soria) organizó una charla de introducción y un Curso 0 de Esperanto, impartido por nuestro compañero Carlos García, que según los propios organizadores despertó muchísimo interés entre todos los asistentes. Un par de ejemplares de "La Eta Princo" ("El principito" en esperanto) fueron sorteados entre los participantes.

La noticia fue recogida al día siguiente en un artículo en la contraportada del periódico "El Heraldo de Soria", con foto de Carlos incluida, como puede verse en [este enlace](#).

PREZENTADO DE ESPERANTO EN SORIO

Okaze de la Tago de Eŭropo, la sekcio de la Oficiala Lingvo-Lernejo de El Burgo de Osma (provinco Sorio, Kastilio kaj Leono) organizis enkondukan prelegon pri Esperanto plus Bazan Kurson, gviditajn de nia kolego Carlos García, kiuj laŭ la organizantoj mem vekis tre grandan intereson inter ĉiuj ĉeestantoj. Du ekzempleroj de "La Eta Princo" estis lotumitaj inter la partoprenantoj.

La evento estis raportita la sekvan tagon en la provinca ĵurnalo "El Heraldo de Soria", inklude de foto de Carlos, kiel oni povas vidi en [tiu ĉi ligilo](#).

Idiomas para unir pueblos y países

La sección de la Escuela Oficial de Idiomas en El Burgo de Osma celebró, por tercer año consecutivo, el Día de Europa con un programa abierto a todos para dar a conocer la multiculturalidad de las lenguas. La jornada comenzó con un quiz sobre las lenguas que permitió que los alumnos del centro que acudieron hasta el aula disfrutaran aprendiendo sobre vocabulario y tradiciones. Después Charlie llevó a cabo una charla en inglés que ayudó a los asistentes a conocer un idioma desde el punto de vista del que habla, del que escucha y de lo que realmente quiere decir, haciendo bromas sobre las malas interpretaciones de las lenguas.

El cierre de la jornada fue la clase impartida por el soriano Carlos García sobre el esperanto. Gracias a sus aportaciones los alumnos se acercaron hasta esta lengua que nació en Babel, hoy en Babelita, gracias al objetivo de Ludwik Lejzer Zamenhof que buscaba crear una lengua pacificadora que uniera a las gentes en torno a esta moderna Torre de Babel en la que



Alumnos asistentes a la celebración del Día de Europa durante la clase de esperanto...

PRESENTA TU CANDIDATURA PARA EL CONGRESO DE 2015

La Asamblea de la Federación Española de Esperanto en Ronda debatió y aprobó la propuesta de normativa básica para la organización de los Congresos Españoles de Esperanto, que está a disposición de los miembros de la asociación en el espacio interno de la página web, y también puede ser remitida a los grupos y esperantistas que lo deseen. La

PREZENTU VIAN KANDIDATECON POR VENONTA KONGRESO

La Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio en Arundo debatis kaj aprobis la proponon pri Regularo de Hispanaj Kongresoj de Esperanto, kiu jam troviĝas je la dispono de la membroj de la asocio en la interna spaco de la retejo de HEF, kaj ankaŭ povas esti sendita al la grupoj kaj esperantistoj ĝin petantaj. La Kunveno debatis ankaŭ la diversajn eblecojn por

Asamblea debatió también diferentes posibilidades para la realización del Congreso del año 2015, sin llegar a ninguna decisión definitiva. La Directiva de HEF tomará una decisión durante los dos próximos meses, por lo que aquellos grupos y activistas que deseen presentar su candidatura aún están a tiempo. Enviad vuestras propuestas a hef@esperanto.es, y aprovechad la posibilidad de disfrutar de un evento único en vuestra propia ciudad y de mostrársela a los esperantistas españoles y de todo el mundo.

la okazigo de la Kongreso de la jaro 2015, sed ne atingis definitivajn decidojn. La Estraro de HEF prenis decidojn dum la venontaj du monatoj, kaj do grupoj kaj aktivuloj kiuj deziru prezenti sian kandidatecon, ankoraŭ povas tion fari. Sendu viajn proponojn al hef@esperanto.es, kaj profitu la eblecon ĝui unikajn eventojn en via urbo kaj montri tiun ĉi al la hispaniaj kaj tutmondaj esperantistoj.

PARA CONTACTAR CON LA FEDERACIÓN

Recordad que en la página <http://www.esperanto.es/hef/index.php/contactar> están disponibles las principales direcciones de correo para contactar con la Federación Española de Esperanto, en función de vuestras necesidades. En concreto, recordad que para cualquier cuestión de tipo organizativo o administrativo (por ejemplo, para obtener justificantes de donaciones relacionados con la actual campaña de Declaración de la Renta), podéis escribirnos a admin@esperanto.es.

Recordad también que la Federación mantiene cuentas en las principales redes sociales. Por ejemplo en Facebook ([facebook.com/esperanto.es](https://www.facebook.com/esperanto.es)), Twitter (twitter.com/esperantoes) o [Google+](https://www.google.com/+esperanto). Si dispones de cuenta en cualquiera de ellas, no dudes en seguirnos y comunicarte con nosotros por cualquiera de esos medios. También recomendamos que estés atento a nuestro canal de Youtube ([youtube.com/esesperanto](https://www.youtube.com/esesperanto)), muy activo en este periodo post-congresual.

POR KONTAKTI KUN LA FEDERACIO

Memoru ke en la paĝo <http://www.esperanto.es/hef/index.php/contactar> disponeblas la ĉefaj retadresoĵoj por kontakti Hispanan Esperanto-Federacion, laŭ viaj bezonoj. Konkrete, memoru ke por ĉiu organiza aŭ administra afero (ekzemple, kun rilato al informoj pri la avantaĝoj pro donacado ĉe la nun okazanta impostdeklara sezono) oni povas skribi al admin@esperanto.es.

Memoru ankaŭ ke la Federacio flegas aktivajn kontojn en la ĉefaj sociaj retoj. Ekzemple en Facebook ([facebook.com/esperanto.es](https://www.facebook.com/esperanto.es)), Twitter (twitter.com/esperantoes) aŭ [Google+](https://www.google.com/+esperanto). Se vi disponas je kontoj en ajna el ili, ne hezitu nin sekvi kaj komuniki kun ni per tiuj rimedoj. Ni ankaŭ rekomendas ke vi atentu nian kanalon en Youtube ([youtube.com/esesperanto](https://www.youtube.com/esesperanto)), tre aktivan en tiu ĉi postkongresa periodo.